

El fervoja mondo 7/2015

Azerbajĝano: **Firmao Stadler produktos en Azerbajĝano**

En dua plej granda urbo de Azerbajĝano – *Gāncā* estis fine de jaro 2014 metita baza ŝtono por nova produkta entrepreno de la firmao *Stadler Rail*. *Stadler* en la jaro 2014 gajnis konkurson por produkti 27 lit- kaj restoracivagonojn por Azerbajĝanaj fervojoj. Oni atendas, ke tiuj ĉi fervojoj mendos ankaŭ 68 motorvagonkombinaĵojn *Flirt*. Prezidanto *Aliev* promesis al ĉefo de *Stadler* ankaŭ mendon por metroo en ĉefurbo Bakuo, kion origine supozis ricevi *Alstom*. La nova entrepreno povus esti malfermata en jaro 2016 kaj povos produkti 60 veturilojn en jaro.

Francio: **Fervojo SNCF preparas nuligi milojn da laborlokoj**

Franca nacia trafikisto *SNCF* prezentis planon por venontaj kvin jaroj. La entrepreno nuntempe havas 149 mil dungitojn. Baldaŭ povas resti nur 140 mil, kaj en jaro 2015 estos nuligataj mil laborlokoj. En lastaj dek jaroj tamen malkreskis nombro da dungitoj jam je 25 mil homoj. La kompanio trairas reformojn kaj ne troviĝas en facila situacio. Simile kiel en Germanio, ankaŭ en Francio ricevis preferon en longdistanca trafiko aŭtobusoj, kio por fervojo signifas malkreskon en nombro da vojaĝantoj. En internacia trafiko krome en trajnoj *TGV* mankas dezirata komforto kaj ili estas multekostaj. *SNCF* krom tio preferas ĝuste *TGV*, kaj ceteran reton malatentas.

Germanio: **Malplimultaj kamionoj kunremorkaj trafikos en jaro 2015**

Germanaj Fervojoj *DB* ekde nova horaro 2014/2015 reduktis nombron de kamionoj kun remorkoj. Al eksterlando ties trafiko tute finiĝis. En somera periodo 2015 ili trafikis nur sur fervojaj itineroj Hamburgo - *Lörrach* kaj reen, Hamburgo – Munkeno kaj reen. Krom tio validas oferto „Aŭto + trajno“ sur itineroj Berlino – Munkeno kaj reen, kaj Duseldorfo – Munkeno kaj reen, kie pasaĝeraŭtomobiloj estas transportataj per kamionoj, kaj pasaĝeroj uzas plejofte trajnojn. La germana nacia trafikisto planas trafikadon de kamionoj kun remorkoj ekde jaro 2017 tute ĉesigi, ĉar krom alia finiĝos daŭro ekspluatada por transporto de pasaĝeraŭtomobiloj en vagonoj.

Italio:

Unua generacio de motorvagonkombinaĵoj Pendolino serio ETR 450 finis trafikadon

Italio komence de jaro 2015 eltrafikigis unuan generacion de motorvagonkombinaĵoj por rapidtrajnoj *Pendolino*, serio *ETR 450* kun tipa ovala kapo. La eltrafikigon la tieaj fervojoj planis komune ekde fino de horaro por la jaro 2014, tamen la veturiloj ankoraŭ helpis por garantii pligrandigitan kristnaskan trafikon. La lasta trajno do veturis la 1-an de januaro 2015 inter Romo kaj *Reggio Calabria*. *ETR 450* komencis trafiki en jaro 1998 inter Romo kaj Milano. Danke al kliniĝtekniko kaj rapido 250 km/h tie estis reduktitaj vojaĝtempoj de kvin al kvar horoj. En lastaj jaroj la kombinaĵoj servis jam nur por trajnoj *InterCity* aŭ rezervaj vagonaroj.

Korea Respubliko: **Al Kwangju nove sur fervojlinio por grandrapido**

Korea Respubliko malfermis novan, 182 km longan fervojlinion por grandrapido *Osong* – *Kwangju* kun kelkaj haltejoj. En *Osong* ĝi kunligiĝas kun kvarcent kilometrojn longa tia fervojlinio Seulo – *Pusan*. Investoj por konstruado de la fervojlinio atingis 8,35 miliardojn da vonoj. La nova kunligo reduktis veturdaŭron inter Seulo kaj *Kwangju* de 2 horoj kaj 40 minutoj al unu horo kaj duono. Korea Respubliko laŭ donitaĵoj de Internacia Fervojunio *UIC* planas trafikadon sur entute 700 kilometroj da fervojlinioj por rapido 300 km/h. Aktuale ĝi disponas de pli ol 60 motorvagonkombinaĵoj por grandrapida trafiko *KTX* kaj oni parolas pri aĉeto de pliaj 22 kombinaĵoj *Hyundai Rotem* por 377 pasaĝeroj.

Nederlando: **Kompanio Keyrail en januaro 2015 definitive finiĝis**

En Nederlando ekde 1-a de januaro 2015 estis nuligita kompanio *Keyrail*, kiu trafikis ekzemple sur fervojlinio *Betuwe*. Iliaj sesdek dungitoj tial iom post iome transiris al nacia trafikisto de fervoja infrastrukturo *Prorail*, kiu transprenis ankaŭ devojn de la kompanio *Keyrail*. *Prorail* ĝis nun posedis 50 procentojn de akcioj *Keyrail*, kiam 35 % apartenis al haveno Roterdamo, kaj 15 % al haveno Amsterdamo. Por trafikistoj la situacio tiel grave plifaciliĝis, ĉar per tiu ĉi paŝo oni garantias, ke kompletan fervojan infrastrukturon de Nederlando prizorgos nur unu organizaĵo.

Svisio: **SBB grave gajnis pro vendo de havaĵo**

Svisa nacia trafikisto *SBB* notis en jaro 2014 ekonomian sukceson. Enspezoj kreskis, elspezoj malkreskadis, kaj al profito kontribuis precipe sukcesa forvendo de posedaĵoj. Pro enspezoj ĉirkaŭ 8,6 miliardoj da svisaj frankoj (*CHF*), kaj elspezoj ĉirkaŭ 8,2 miliardoj da *CHF* la kompanio atingis profiton 373 milionoj da *CHF*. Tio estas je 56 procentoj pli multe ol en la jaro 2013. *SBB* ankaŭ transportis je 3,7 % da vojaĝantoj pli multe, tio estas 1,18 milionoj da personoj en tago. Zorgojn al Svisaj Fervojoj tamen kaŭzas enŝuldigo, kiu en la jaro 2014 eĉ pli kreskis kaj atingas jam 7,7 miliardojn da *CHF* (ĉirkaŭ 26 milionojn da eŭroj).

Preparis Jindřich Tomíšek,
reviziis Heinz Hoffmann